


BONA ESPERO



**Revuo de la Esperanto-
Asocio de Suda Afriko
Numero 2
2006**

La Redaktoro

Kontribuaĵojn sendu papere (prefere maŝinskribite), aŭ en elektronika formato al la redaktoro:

Poŝte:

Johan KÖHLER
P.O. Box 245
WINKLESPRUIT
4145
Respubliko de Sud-afriko

Retpoŝte: johan.kohler@gmail.com

Ĉi tiu revuo iras al la membroj de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA). Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Ne-membroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto.

S-ro C. Beckford
43 Fairview Crescent
MILNERTON RIDGE
7441
Respubliko de Sud-Afriko

Enhavo

Postkongrese.....	5
Esperanto-etoso regis.....	6
LKK-aj rimarkoj.....	9
Krozante tra reta Esperantujo.....	11
Tago Zamenhof-a.....	15
Zamenhof Day.....	19
William Auld (1924–2006).....	24
Tempo fuĝas	27

Redaktore

Postkongrese

Tiu ĉi numero aperas kelkajn monatojn post la 3a SuSuKo de EASA, kiu okazis en Miuzenberg, Kaburbo. En diversaj manieroj ĝi estis malsimila al antaŭaj tiaj kongresetoj. La kongreseto ĉi jare ĝuis pli internacian etoson kun partoprenado de eksterlandanoj ne nur el Afriko, sed ankaŭ el Eŭropo, kaj samajnlongan postkongresan turisman vojaĝon. Legu en la venontaj paĝoj raporton de gasto eksterlanda. En tiu ĉi numero vi legos ankaŭ nekrologon kaj fikcion de la fama verkisto William Auld, kaj plue pri E-kulturo (Zamenhofa tago).

Ĝis la venonta numero!

Vidpunkto

Esperanto-etoso regis

Unu el la partoprenintoj de la 3a Sudafrika Subkontinenta Esperanto-Kongreso (SuSuKo), el Pollando, raportas el sia vidpunkto.

Andrzej Grzebowski,
INTERNACIA KLUBO "ESPERANTOTUR",
str. M.Sklodowskiej-Curie 10,
PL 85-094 BYDGOSZCZ,
Pollando
Tel./fakso +48 52 346 1151
rete: info@esperanto-turismo.com

Dum la 27 de aprilo ĝis la 5-a de majo 2006 okazis la 3-a Sudafrika Esperanto Kongreso en Muizenberg apud Kaburbo (*Cape Town*) en Sudafriko, kiun partoprenis esperantistoj el Sudafriko, Ganao, DR Kongo, Namibio, Zimbabvo kaj Pollando.

La tutan tempon regis tre bona Esperanto-etoso ne nur pro tio, ke ĝi estis Esperanto-Kongreso, sed ĉefe pro tio, ke la partoprenantoj estis dekkelklingvaj kaj Esperanto bone tie plenumis sian rolon. Valoras substreki, ke en Respubliko de Sudafriko estas 11 oficialaj lingvoj pri kiuj statistiko de 2001 jaro aspektis jene: zulu (23,8%), ksosa (17,6%) afrikansa (13,3%), norda sota (9,4%) angla kaj cvana (po 8,2%), suda sota (7,9%), conga (4,4%), svata (2,7%), venda (2,3%) ndebela (1,6%). Dum publika diskuto pri plurlingveco Prof. Neville ALEXANDER el Universitato de Kaburbo opiniis, ke plurlingveco estas necesa kaj nunan hegemonian pozicion de la angla en la mondo estonte anstatauos alia lingvo - eble ĉina (han) lingvo.

Okazis ankaŭ Jarkunveno de EASA (Esperanto Asocio de Sudafriko), kurso pri Cseh-metoda instruado, kiun gvidis Oliver Mazodze el Zimbabvo, diskutoj pri uzado de Esperanto en Interneto. Prelegis Andrzej GRZEBOWSKI (Pollando) pri Internacia

Studumo pri Turismo kaj Kulturo kaj Esperanto-Turismo kun filmo pri vojaĝoj tra 42 landoj kun “Esperantotur”, Lucyna SOWINSKA (Pollando) pri Junulara E-Teatro “Studio P” el Torún kun filmo “Ni lernas vivi” kaj Oscar Sher (Sudafriko) pri judaj kutimoj.

La Kongreso okazis en bela kaj komforta kampadejo Zandvlei ĉe Falsa Bay en Muizenberg (ĉe la monto de Muizen¹ – tre ĉarmaj bestetoj similaj al marmotoj, sed indiĝenaj). Ĉiutage okazis tre interesaj ekskursoj tra belega Kabduoninsulo. Oni aĉetis fiŝojn en Kalk Bay kaj poste piknikis inter multaj pingvenoj en Boulders Beach. Ni vojaĝis al Kaba Pinto kaj Kabo de Bona Espero por vidi de rokoj samtempe Hindan kaj Atlantikan Oceanojn, ankaŭ observi antilopojn, zebrojn kaj atakemajn simiojn – pavianojn. Ni vizitis Langa malriĉajn kvartalojn (angle: “townships”) kaj riĉajn Marina de Gama en Muizenberg, ankaŭ faman hospitalon de transplantado Grootte Schuur. Naturrezervejon Rondevlei kun 230 specoj da birdoj montris al ni botanike kaj ornitologie tre sperta Axel VON BLOTTNITZ. Forta vento timigis hipopotamojn, kiujn ni ne povis vidi, sed ni piknikis tie kun antilopaj, struĉaj kaj bovaj viandaĵoj.

Pluran tagon ni dediĉis al la plej granda afrika Botanika Ĝardeno Kirstenbosch, atlantika marhaveno Hout Bay, marferiloko Camp’s Bay. Tutan tagon ni dediĉis por vizitado de Kaburbo kaj ĝiaj historiaĵoj. Ni ekskursis per kabloveturilo al Tablo Monto por spekti belajn vidindaĵojn, al Paarl-urbo por vidi monumenton de afrikansa lingvo, gustumadis fromaĝojn kaj vinojn en Fairview, vizitis Stellenbosch – pitoreskan universitaturbeton kaj ĉefurbon de vinejoj.

La lastan tagon ni vizitis Waterfront en Kaburbo kun ĝia Akvario de du Oceanoj kaj ŝipekskursis tra Haveno de Kaburbo renkontante plurajn fokojn. Ni adiaŭis Kaburbon kaj Atlantikon

1. *Muizen* estas la nederlanda por “musa”

per vizito en ferilokoj Sea Point kaj Clifton. Dum dek tagoj ni ne nur kongresis kaj multe diskutis, sed dank' al tre bona akcepto kaj Esperanto-gvidado ĉefe de Magali, Harro kaj Axel VON BLOTTNITZ ni multon vidis kaj lernis pri tiu fora regiono de Kabduoninsulo en Sud-Afriko.

Vidpunkto

LKK-aj rimarkoj

LKK-ano rimarkas pri sukcesoj de la kongreso.

Magali VON BLOTTNITZ

Andreo trasendis sufiĉe detalan raporton pri la kongreso kaj la okazaĵoj de la sekvintaj tagoj. Ne ĉio estis sukcesa kaj facila en la kongreso, kompreneble. Bedaŭrinde, krom la kutimaj komitatanoj, la Kaburbaj esperantistoj ne multe partoprenis. Kaj la laboro estis sufiĉe peza por la organizantoj. Tamen, indas rimarki, ke nia kongreso el pluraj vidpunktoj portis novajn sukcesojn.

- Nia aranĝo estis la unua EASA-kongreseto, kiu allogis plurajn homojn de eksterlando (en pasinteco ni havis diversnaciajn partoprenintojn sed ili ĉiuj restadis en Sudafriko, kun escepto de Bernard Londoni en 2002) – laŭ tiu vidpunkto ĝi estis sukceso. La grupo el Pollando riĉigis nian kongreson, kaj speciale la sukceso de viz- kaj vojaĝplanoj de Martha el Ganao kaj Oliver el Zimbabvo estis vera feliĉo, ĉar nia asocio tro malofte ricevas vizitantojn el aliaj afrikaj landoj!
- Estis la unua fojo ke ni uzis la kongreson por vera publika okazaĵo kaj, kvankam ĝi apenaŭ allogis homojn, ĝi tamen estas salutenda okazaĵo; konata lingvoaktivulo Dr. Neville Alexander sin esprimis ĝenerale pozitive pri esperanto kaj bonkore akceptis niajn donacitajn esperanto-librojn;
- Ni sukcesis lanĉi niajn zuluajn broŝurojn dum tiu publika vespero.
- Ankaŭ por la unua fojo ni uzis la kongreson por okazigi trejnkurseton por niaj instruistoj rilate al la Cseh-metodo. Kvankam tiu kurseto estis tro modesta por rajtigi iun ajn pri iu Cseh-kvalifiko, kaj bedaŭrinde tro malmultaj homoj

partoprenis, ĝi tamen donis al kelkaj de niaj instruistoj novajn eblecojn por instrui. Ankaŭ, tre feliĉe, Oliver proprainiciate decidis oferti kurson al komencantino Martha kiu estis esperinta iun komencantan kurson;

- La financoj de la kongreseto estis relative balancitaj - dank al la kontribuoj de EASA kaj Hans fondaĵo, ni respektis nian buĝeton.

Laŭ tiuj vidpunktoj la kongreso relative bone sukcesis. Dankon al la organiza teamo kaj dankon al ĉiuj partoprenantoj kaj kontribuantoj!

Esperanto en Interreto

Krozante tra reta Esperantujo

La Loko produktas tvistajn simulaĵojn de amaskomunikilaj kaj korporaciaj strukturoj, kaj enmetas la idealisman lingvon Esperanto, kie oni kutime supozas la anglan. La Loko celas pripensi la manieron kiel lingvo, bildoj kaj lokoj originas, funkcias kaj influas nin.

Olof Olsson kaj Daniel Salomon
Pri la La Loko (<http://www.laloko.org>)

Ekzemple, La Loko produktis la provepizodon de la unua esperanta sitkomo (serikomedio) en la mondo. La Loko ankaŭ funkciigis la prototipon de esperanta krakmanĝejo. Ĉi jare La Loko iniciatis kampanjon por igi FIFA permesi ke Esperanto-teamo partoprenu la kvalifikiĝojn de la Monda Pokalo en SudAfriko en 2010.



La Loko komencis en septembro 2003. Ni laboras ene de la terenoj de arkitekturo, arto, forsendado, danco, dezajno, ekonomiko, filmo, gastameco, gastronomio, instruado, merkatumado, muziko, politiko, verkado kaj pli. Ĉiuj niaj agadoj uzas la universalan lingvon Esperanto kiel ilo, referenco, metodologika modelo, ekkaŭzo kaj/aŭ temo.

Hipoteza kosmo

Lingvo estas ilo kiun oni uzas por komuniki kaj materialigi pensojn. Pro sia komplekseco oni povas esprimi preskaŭ ĉion. Sed kun iu mesaĝo kiun ni produktas aŭ ricevas, sekvas tuta aro de kulturaj referencoj kaŭze de la specifeco de la lingvo. Kiam ni parolas aŭ aŭdas lingvon, kie ajn ni estas, ni trovas nin – konscie aŭ ne – inter formoj, bildoj, sonoj kaj odoroj apartenantaj al specifa kulturo.

Esperanto, tamen, ne apartenas al iu lando aŭ kulturo. Estas lingvo sen videbla mondo. Ĉi tiu manka universo estas ĝuste tiu kiun ni celas inventi. Kiel aspektus esperanta tablo? Kaj kio esperantigus pladon? Kaj kio pri esperanta modo, ĉu tio estas imagebla? La



La lanĉo de Kolbasoj sen Limoj okazis en la Viva Art Muzeo en Rejkjaviko. Dum la evento islandanoj povis gustumi la novan specon de kolbaso en pano, kiu enhavas la novan ŝafan Kolbason sen Limoj, manfaritan panon kaj la speciala rouĝkapsiko-KSL-saŭson

tasko estas senfina.

Ni ne atendas atingi la veron per alrespondi ĉi tiujn demandojn. Ni uzas la ideon de esperanta mondo por ekagigi la dezajnadon de ennovigaj objektoj, kaj samtempe malkodi la gramatikon de ekzistantaj aferoj.

Pragmata metodo

La deirpunkto de La Loko estas la hipotezo de Esperanta mondo; malgraŭ tio estas en la intertraktado kun vera socia, ekonomia aŭ politika kunteksto, ke ni trovas la kernon de nia laboro. Por defii niajn ideojn kaj ankaŭ larĝigi nian kampon de agado, La Loko diversigas siajn lokojn, siajn metodojn kaj siajn perspektivojn.

Interalie La Loko estas la nomo de nia kompanio. Esperanta produkto estas difinita per sia struktura, estetika kaj spirita analogio al esperanto: kiel esperanto, niaj produktoj estas simplaj, malkaŝemaj, funkciaj, adaptiĝemaj, belaj, etikaj, demokratiaj, amikaj kaj kosmopolitaj. Ĉi tiuj valoroj estas la veraj fundamentoj de nia dezajnaĵo, kaj ankaŭ grandaj vendargumentoj. Kvalito asociita kun forta varmarkigado igos La Loko sana komerco, kaj pro tio alportas al ni la eblecon financi la neprofitajn agadojn de La Loko.

Interŝanĝe ni antaŭenigas la lingvon. Kvankam la movado estas pli granda ol homoj kutime pensas, estas vere ke esperanto suferas sian nepravigitan bildon de ne sukcesita utopio. Nuntempa varmarkigada strategio estas necesa por alporti al esperanto la popularecon kion ĝi meritas.

Esperanto — la ideo de plene funkcianta internacia lingvo kiu estas facile lernebla — venis el la idealisma menso de la pola oftalmologo Ludwik Zamenhof pli ol cent jaroj antaŭe, kaj hodiaŭ La Loko utiligas la eblecojn de la merkato por disvastigi ĝin.

Kial La Loko nomiĝas La Loko?

Esperanto jam alportis al ni multajn riĉigajn spertojn kaj ankaŭ multajn amikojn tra la tuta mondo. Nia konvinkiĝo ke esperanto igus la mondon pli bona loko estas forta. Cetere ni nun scias ke ni povas apliki ĝin konkrete en nia dezajnlaboro kaj ni intencas merkati niajn inventaĵojn kiel esperantaj produktoj.

Sed krom ĉi tio, ni instigiĝas unue kaŭze de fundamenta scivolemo. Kiuj estas la rilatoj inter objektoj, lingvo kaj ekonomio? Kaj kiel homoj interrilatas kun ili? Por respondi tiujn demandojn ni elektas partopreni aktive interne de kaj inter sistemoj.

Pli filozofe, La Loko estas konsidero pri la koncepto de ejo. La Loko estas spaco, kiu estas nek difinita geografie, nek ligita al specifa tereno aŭ fako. Estas elasta, multforma kaj movebla; mensa spaco kion ni konstruas per nia laboro por ĉiam havi eksteran vidpunkton pri tio, kion oni kutime nomas la reala mondo.

Esperantujo

Tago Zamenhof-a

Bloguloj festos Esperanto-tagon

El: Libera Folio 2006-11-02 09:41

Steven Brewer, unu el la aktivuloj de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko, starigis kampanjon por ke la 15-an de decembro 2006 aperu laŭeble multaj dulingvaj artikoloj pri lingvaj problemoj en retaj taglibroj. Li ricevis multajn favorajn reagojn de neesperantistoj, kiuj pretas partopreni, aperigi esperantlingvan tradukon de sia blogo en la koncerna tago, aŭ eĉ mem lerni Esperanton ĝis la 15-a de decembro. Inter esperantistoj la reago laŭ li ial estis malpli entuziasma. "La plej surpriza respondo estas la malintereso kaj miskompreno flanke de diversaj Esperantlingvaj blogistoj. Kelkaj respondis al mi tuj, ke ili ne blogas pri Esperanto, sen eĉ kompreni ke la projekto tute ne celas tion", li diras. **Libera Folio** intervjuis la iniciatinton.



Libera Folio: Kiu estas la celo de via iniciato?

Steven Brewer: La celo estas dum unu tago vekti la intereson de la publiko pri tio, kio estas Esperanto kaj kiajn problemojn en la mondo ĝi celas solvi. Ni serĉas blogistojn kiuj pretos la 15-an de decembro afiŝi dulingvan blogaĵon pri lingvaj problemoj el la vidpunkto de la propra hejmo, urbo, lando, aŭ regiono.

Multaj homoj ne tuj komprenas ke, kvankam la afiŝo estu en Esperanto, ĝi ne necese estu pri Esperanto mem. Ni volas ke oni skribu pri lingvaj problemoj el privata vidpunkto: Pri tio, kion "lingvo-problemo" signifas por vi aŭ via komunumo. Sed ĉiuj artikoloj estos haveblaj por ke la Esperanto-komunumo povu informi sian lokan gazetaron.

Tio ĉi ne nur estas por informi la ne-esperantistan publikon. Lastatempe, en Esperantujo, aperis multaj artikoloj kiuj konsilas ke oni ne parolu pri "lingvaj problemoj" kaj speciale ne pri "la lingvoproblemo". Sed mi esperas ke dialogo komenciĝos, per kiu esperantistoj povas doni kaj mem ekhavi pli multflankan perspektivon pri kion oni pensas, kiam oni diras "lingvoproblemo".

Kiam mi starigis tiun ĉi projekton, mi celis ĝuste blogistojn por diversaj kialoj, sed plej grave, ĉar ĉiufoje kiam oni sukcesos interesi blogiston, ili plu diskonigos la ideon kaj pligrandigos la efikon de la laboro. Unu artikolon dek blogistoj legos kaj verkos pliajn dek artikolojn, kiujn legos centoj...

Libera Folio: Ĉu multaj jam reagis al via propono?

Steven Brewer: La reago estas ĝenerale pozitiva. Preskaŭ tuj, grupo de proksimume 15 homoj aliĝis al retpoŝta listo por organizi

la projekton, kaj ili multe helpas antaŭenigi ĝin. Dum du monatoj, ni plejparte kontaktas blogistojn retpoŝte, kaj ni komencis ĉe tiuj, kiuj jam parolas Esperanton. Je la fino de septembro, ELNA finance subtenis reklamon ĉe konata blogejo, kaj de tie komencis alveni homoj, kun kiuj antaŭe ni ne havis personajn kontaktojn. Proksimume kvardek jam konsentis partopreni, kaj mi esperas ke la nombro multobliĝos dum ni proksimiĝos al la tago mem.

La reklamo ankaŭ montris la pravecon de la originala ideo: unu homo, kiu vidis la reklamon, verkis belan artikolon en la hispana, kaj tiu artikolo estigis alian artikolon en la galega kaj multe da intereso. Fakte, tiom da homoj vidis tiun artikolon, kaj ĝiajn sekvojn, ke la efiko de tiu sola artikolo egalas trionon de la efiko de la tuta reklamo mem.

Libera Folio: Kiajn reagojn vi ricevis? Ĉu estis iuj kritikoj, kiuj igis vin modifi la planon?

Steven Brewer: La plej surpriza respondo estas la malintereso kaj miskompreno flanke de diversaj Esperantlingvaj blogistoj. Kelkaj respondis al mi tuj, ke ili ne blogas pri Esperanto, sen kompreni, ke la projekto tute ne celas tion. Mi fakte pli sukcesas, kiam mi kontaktas homojn kiuj ne blogas Esperante. La ne-esperantistoj vere interesiĝas pri la ideo kaj ŝajne multon volas diri.

Por mi, la fakto ke multaj homoj vidos la artikolojn, estas nur duono de la afero. Alia sekvo estas, ke ni ekhavas multajn interligojn inter niaj blogoj - tio altigos la rangon de niaj blogoj laŭ la blogaj mezuriloj (ekzemple Technorati kaj Google). La projekto ankaŭ helpas nin ekscii unu pri la aliaj. Fine, mi pli kaj pli konstatas, ke multe pli da homoj interesiĝos pri Esperanto, se ili vidos, ke ĝi ja taŭgas por io, kaj ke oni vere uzas ĝin. Kiel

montri tion? Tiu ĉi projekto montras, kiel oni vere povas uzi Esperanton por komuniki internacie kaj grandskale.

Multaj neesperantistoj bezonos, ke iu simple traduku iliajn artikolojn. Sed mi ankaŭ scias, ke kelkaj uzas tiun ĉi projekton kiel ŝancon por eklerni Esperanton, kaj celas sufiĉe bone regi la lingvon antaŭ la Esperanto-Tago por mem povi verki la esperantan parton.

Ankaŭ montriĝas subteno ĉe kelkaj el la blogistaj organizaĵoj. Global Voices (Terglobaj Voĉoj) konsentis ke mi verku monatajn artikolojn pri Esperanto-Tago dum la antaŭaj tri monatoj (por reklami), por Esperanto-tago (por celebri), kaj poste (por resumi). La unua kaj la dua jam aperis.

Libera Folio: Ĉu vi ne supozas, ke la blogemaj esperantistoj jam blogas en Esperanto, eĉ sen via alvoko? Ĉu tiuj aldonu nacilingvan version en la koncerna tago?

Steven Brewer: Estas, fakte, jam kelkcent aktivaj blogoj en Esperanto. Ĉi tiu projekto tamen ne rekte celas la starigon de esperantlingvaj blogoj. Mi celas konvinki tiujn, kiu ĝis nun verkis nur nacilingve, dum unu tago montri siajn ideojn pri lingvo al pli granda komunumo.

Mi ankaŭ volas, ke la pli granda mondo de blogistoj rekonu la ekziston de tiu ĉi paralela, internacia blogosfero. Ĝi estas interesa komunumo kaj kontribuas per interesa gusto al la monda dialogo, kiun oni estimu kaj kies valoron oni rekonu.

Libera Folio: Kiel multajn dulingvajn blogojn vi esperas vidi la 15-an de decembro?

Steven Brewer: Se ni atingos centon, mi plene feliĉos. Sed tute ne estas kialo ne atingi mil aŭ dekmil. Dependas de tio, ĉu oni opinios la ideon subteninda, kaj ĉu homoj dediĉos sin al la celo diskonigi la ideojn al la aŭtoroj de la blogoj kiujn ili legas.

Libera Folio: Ĉu ie aperos ligo-listo al la partoprenantaj blogoj, aŭ ĉu en alia maniero eblos trovi ĉiujn dulingvajn blogojn, kiuj aperos en tiu tago?

Steven Brewer: Je la nuna momento, troviĝas listo de partoprenontoj kaj subtenantoj en la dekstra flanko de nia hejmpaĝo . Ni ne precize scios kiu vere partoprenos ĝis venos la tago.

Kiam venos la tago, mi starigos paĝon kaj daŭre kolektos ligojn al la paĝoj. Oni simple venu al nia retejo je Esperanto-Tago, kaj mi certigas ke vi trovos multon. Krome mi resumos la tuton per dulingva artikolo ĉe Terglobaj Voĉoj.

Ĝis tiam, mi petas ke laŭeble multaj (1) partoprenu, se vi mem skribas blogon, (2) invitu la partoprenon de ĉiuj blog-aŭtoroj kiujn vi konas en kiu ajn lando, (3) metu niajn retbildojn kaj butonojn ĉe ĉiuj retpaĝoj kie vi povas, kaj (4) pretu kontribui per iom da tempo por traduki blogaĵojn de ne-esperantistoj. Mi kore dankas!

English

Zamenhof Day

Wikipedia (http://en.wikipedia.org/wiki/Zamenhof_Day)

December 15 (Zamenhof Day, *Zamenhofs Tago*) is the birthday of L. L. Zamenhof, the initiator of Esperanto. Many Esperanto speakers will buy an extra Esperanto book around this time of year. There are also special Esperanto gatherings (parties) throughout the world to celebrate the occasion, also used as a reason for Esperantists to get together during the winter holiday season. It is the most widely celebrated day in Esperanto culture.



L.L. Zamenhof

Some Esperanto-speakers, not wanting to over-celebrate the achievements of a single man, have suggested celebrating December 15th instead as Esperanto Literature Day. Thus they encourage Esperanto organizations that hold gatherings on that day to add a book review or poetry reading to the program or to announce the publication of a new book. On an individual level, one can buy a book or start reading a new book or in some way celebrate Esperanto literature on that day.

Esperanto Day on the web

In 2006 there was a drive to get people blogging (see article p.15). Here are a few blog excerpts.

**Estis ne nur tago, sed
zamenhofa semajno ĉe ni...**

La pasintan semajnfinojn
a2na kaj mi instruis senpagan
dutagan (dekduhoran) kurson
pri Esperanto al komencantoj.
Tio postulis multan preparadon
laboron antaŭ la evento, kaj ni
iom timis ke ĝi povus fiaski,
sed ĝi iris sufiĉe glate. Ni trovis
homojn per serĉo de "Vroclavo"
ĉe <http://lernu.net>, kelkaj
reklamafiŝoj apud la
universitato kaj en la (unusola,
ve) loka vegetara restoracio,
menciado al konatoj, ktp.
Sabaton venis ĉ 12 homoj, kaj 7
revenis dimanĉon, kaj ni
esperas ke iuj restos interesata
pri la lingvo kaj daŭrigos la
studadon. (Ni planas regulajn
malpli formalajn renkontiĝojn
por helpi ilin.) Kuninstruado
estis agrabla sperto, kiun ni
rekomendus. La fakto ke mi ne
bone parolas pole, tamen la
lernantoj povis ofte kompreni
min bone en Esperanto, montris
al ili ke la lingvo funkcias...

[\(http://goulo.livejournal.com/\)](http://goulo.livejournal.com/)

**It was not only
Zamenhof Day, but
Zamenhof Week for us...**

Last weekend *a2na*
and I taught a free 2-day
(12-hour) course about
Esperanto to beginners.

That took a lot of
preparation time before
the event, and we were a
little fearful that it would
flop, but it went well. We

found people by
searching "Wrocław" at
<http://lernu.net>, some
posters near the
university and in the
(only, alas) local
vegetarian restaurant,
word of mouth, etc.

Saturday there were
about 12 people, and 7
returned Sunday, and we
hope that some will
remain interested and
stick with it. (We are
trying to set up regular
informal meetings to
help them.) Co-teaching
was an enjoyable

[225570.html](#))

experience, which we recommend. The fact that I don't speak Polish well, yet the students could often understand me well in Esperanto, showed them that the language works....
(<http://goulo.livejournal.com/225570.html>)

Today is Esperanto Day

I've been really interested to follow this article by Henri Masson in advance of Esperanto Day, in which there is a huge thread of comments and discussion -- all in French. Using Google Translate I was amused/bemused to see that one whole thread was devoted to whether or not my position merited being called "Professor". Ve!

Using Google Translate really makes me appreciate Esperanto. It does produce a translation which you can sort-of follow, like this snippet: "Out of terminal, I

Hodiaŭ estas Esperanto-Tago

Tre interesas min sekvi tiun ĉi artikolon fare de Henri Masson kiun li afiŝis antaŭ Esperanto-Tago kiu enhavas longegan fadenon da rimarkoj kaj komentoj -- ĉiuj en la franca. Per Google Translate mi amuziĝis/malamuziĝis vidi ke tutan fadenon da rimarkoj temas ĉu mia posteno meritas la terminon "Profesoro". Ve!

Uzi Google Translate vere igas min taksi Esperanton pli alte. Ĝi ja produktas tradukon kiun

did not think any more that English has, cursing it, while while laughing, while calling 'the Help |'." But when you talk to someone in Esperanto, its just like talking -- and you can just understand them. I can't imagine trying to use Google Translate for anything that mattered.

(<http://esperanto-usa.org/node/621>)

oni povas plimalpli kompren, kiel tiu ĉi: "El finaĵa, Mi ne pensis iom ajn pli ke la angla havas, malbeninte ĝin, dum dum ridante, dum vokante 'la Helpu Mi'." Sed kiam oni parolas Esperanto, estas simple kiel paroli -- kaj eblas simple kompreni ilin. Mi ne povas imagi ke mi iam uzus Google Translate por io, kiu vere gravus.

(<http://esperanto-usa.org/node/621>)

Esperantujo

William Auld (1924–2006)

La 11an de septembro 2006 ĉesis bati la koro de la plej eminenta el la nuntempaj esperantistoj

William (Bill) Auld.

La Ondo de Esperanto (<http://www.esperanto.org/Ondo/Novaj/Nov06-24.htm>)

Skoto William Auld naskiĝis la 6an de novembro 1924 en Suda Anglio, kie lia patro provizore laboris, sed ekde 1933 la familio Auld revenis al Skotlando. Tie William lernis, laboris kiel instruisto kaj emeritiĝis kiel vicestro de liceo. En 1942–46 William servis en la brita flugarmeo, interalie kiel piloto en *Spitfire*.

Esperantisto ekde sia 14a jaro, Auld post la reveno el la armeo komencis verki en Esperanto poemojn por Esperanto en Skotlando, kaj en 1952 li debutis antaŭ la internacia legantaro per poemciklo *Spiro de l' Pasio* en la poemaro *Kvaropo*. Kvar jarojn poste aperis lia 25-ĉapitra poemego *La infana raso*, poste kelkfoje reeldonita, interalie ankaŭ en la nederlanda, portugala kaj hungara tradukoj. Poste li verkis aliajn poeziajn librojn en Esperanto, kaj multaj el liaj prozaj libroj kaj eseoj estis kolektitaj en *Pajleroj kaj stoploj* (1997).

Kvankam unue Auld diskoniĝis kiel poeto, lia posta agado estis tre multifaceta. Li kompilis antologiojn anglan (1957), skotan (1978) kaj Esperantan (1958) kaj *Novan Esperantan Krestomation* (1991). Jam ses eldonoj de lia progresiga lernolibro *Paŝoj al plena posedo* aperis. Li estis vicprezidanto de Universala Esperanto Asocio (UEA) kaj prezidanto de la plej alta lingva instanco de

esperantlingvanoj Akademio de Esperanto (1979–1983). Ekde 1999 ĝis 2002 li prezidis la Esperantan PEN-Centron. Auld estis redaktoro de la organo de UEA Esperanto, kaj ankaŭ de la literaturaj gazetoj *Monda Kulturo*, *Norda Prismo* kaj *Fonto*, kaj dum pli ol kvarona jarcento li redaktis *La Britan Esperantiston* (1973–2000).

Eminenta estas lia traduka agado. Interalie li tradukis la sonetojn de Ŝekspiro kaj ties verkojn *Epifanio* aŭ *Kiel vi volas* kaj *Komedio de Eraroj*. Ekde 1993 William Auld intime kunlaboras kun ruslanda eldonejo Sezonoj, ĉe kiu aperis kelkaj liaj tradukoj inkluzive de la trivoluma epopeo de Tolkien *La Mastro de l' Ringoj* entuziasme akceptita de la legantaro kaj la kritiko.

Lia literatura agado premisis lian kandidatigon por la literatura Nobel-premio. (Estis unua fojo kiam iu estis kandidatigita pro verkoj en Esperanto.) Kvankam ne li, sed Grass, ricevis tiun premion, la kandidatigo kaŭzis multajn pozitivajn menciojn pri Auld kaj pri la Esperanta literaturo en la amaskomunikiloj tra la mondo (*Times*, *Daily Telegraph*, *Le Monde*, *La Stampa*, *BBC* kaj multaj aliaj), kaj internacia elektantaro, formita dank' al la iniciato de *La Ondo de Esperanto*, proklamis lin *La Esperantisto de la Jaro* 1998. Li estas ankaŭ plurfoja laŭreato de la Belartaj Konkursoj de UEA, laŭreato de la premio *Onisaburo Deguchi* (1995) kaj de la *Esperanto-Kulturpremio de Aalen* (2000). Lia librokolekto en 2001 estis transdonita al Skota Nacia Biblioteko en Edinburgo.

Nelonge antaŭ sia forpaso Auld donis sian konsenton pri reeldono de *La Mastro de l' Ringoj*, kiu aperos venont-jare. Homoj mortas, sed iliaj verkoj povas esti senmortaj, kaj la memoro pri William Auld vivos tiom longe, kiom en la mondo restos legantoj de libroj en Esperanto.

Ĉefaj verkoj de William Auld

Kvaropo (kun aliaj, 1952),
La infana raso (1956),
Unufingraj melodioj (1969),
Paŝoj al plena posedo (1968),
Humoroj (1969),
*Rimletero*j (kun Boulton, 1976),
Kantoj, poemoj kaj satiroj (Burns, 1977),
Pri lingvo kaj aliaj artoj (1978),
Aniaro (Martinson, 1979),
Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto (1979),
La sonetoj (Shakespeare, 1981),
Montara vilaĝo (Chun-Chen Yeh, 1984),
Kulturo kaj internacia lingvo (1986),
La komedio de eraroj (Shakespeare, 1987),
En barko senpilota (1987)
La fenomeno Esperanto (1988),
La Mastro de l' Ringoj (Tolkien, 1995–1997),
Pajleroj kaj stoploj (1997),
La ĉashundo de la Baskerviloj (Conan Doyle, 1998),
Jurgen (Cabell, 2001).

Libroj pri li

Lingva arto (Rotterdam: UEA, 1999),
75 jaroj (Jekaterinburg: Sezonoj, 1999).

Fikcio

Tempo fuĝas

de William Auld

El: Monato (<http://www.esperanto.be/fel/mon/002000.html>)

Malgraŭ sia juneco - li certe ne aĝis pli ol tridek kvin jarojn, kio ŝajnis al mi juna - mia najbaro Arturo Preston estis siatempe akirinta konsiderindan reputacion kiel debuta sciencisto. Kiam li heredis iom da mono kaj liberiĝis el sia posteno kaj sin retiris de la publika konateco, iuj homoj esprimis bedaŭron pri lia „neuzota talento”. Tiuj ja ne sciis - verŝajne neniu sciis krom mi - ke li dediĉas sian tempon kaj sian monon al solvado de antikva enigmo, nome vojaĝado tra la tempo. Tion sciis mi, nur pro tio, ke Arturo jam delonge traktis min kiel surogatan patron, personon fidindan, kun kiu li povis komunikiĝi. Pri la fiziko, kiel ankaŭ pri aliaj sciencoj, mi sciis nenion, sed kompreneble tia scio ne necesis. Arturo bezonis nur alparolaton, ne nepre aŭskultanton.

Principe tamen mi opiniis ekscita lian koncepton pri tempovojaĝado, sed ege neprobabla. Kiam do li sin prezentis en mia domo iun posttagmezon kaj, streĉaspekta sed reganta siajn emociojn, diris, „Mi sukcesis!”, mi estis konsternita kaj ne volis kredi lin.

„Mi vojaĝis en la pasintecon dekfoje dum la ĵusa horo, kaj mi restis en la elektitaj epokoj dum periodoj ekde dek minutoj ĝis dek tagoj,” li diris kviete, tamen kun bridita ekscitiĝo. „Ne temas pri hazardaĵo, mi certigas. Tio, kion mi ofte diris al vi pri la naturo de la tempo kaj kiamaniere jungi ĝin, estas vera, vera, vera!”

„Se tio vere veras, Arturo -” mi komencis iom hezite; sed li ekkaptis mian brakon kaj tire starigis min.

„Venu vidi mem.”

Eble influite de la konata romano de Jean Forge, mi atendis, ke lia aparato estu pli komplika. Sed ne; laŭaspekte ĝi estis nenio alia ol rektangula skatolego iom pli granda ol homa staturo, kun pordo por eniri kaj eliri, staranta en ĉambro alie senmebla.

Arturo malfermis la pordon kaj ni enrigardis. La internon prilumis iaspeca ampolo, kvankam mi ne rimarkis signojn de potencigo. Sur unu muro vidiĝis instrumentaro en la formo de ŝaltilo kaj pluraj numeritaj ciferplatoj.

„Oni nur indikas la deziratajn tagon, monaton kaj jaron sur la ciferplatoj, depremas la ŝaltilon, kaj sonorilo tintas indikante la alvenon. Oni malfermas la pordon kaj eliras - en la deksecan jarcenton aŭ kiam ajn oni elektis.”

„Vi devas konsenti, Arturo, ke tio ŝajnas iom neprobabla...”

„Mi tion faris jam dekfoje, ĉu ne? Dekfoje, al dek diversaj epokoj!”

„Sed la revenvojo? Kiel vi revenas?”



„Nu jes, tio en la komenco kaŭzis al mi iom da zorgoj. Mi fine solvis ĉiujn problemojn, aŭtomatigante la revenon al la preciza minuto de la foriro. Necesas nur reeniri la maŝinon, premi la ŝaltilon kaj - pum! oni revenas al la nuntempo. Aŭskultu, mi vidas, ke vi daŭre iom skeptikas. Kial ne provi mem?”

„Ho, pri tio mi ne certas. Mi - mi ankoraŭ ne mense prepariĝis.”

„Nenia danĝero. Jen! mi montros al vi. Decidu vi, al kiam mi vojaĝu, kaj mi iros tiamen. Diru do, kiam?”

„Ho - nu - 1836.”

„Bone!”

Li eniris la maŝinon kaj fermis la pordon. Mi aŭdis mallaŭtan tinton de sonorilo, la pordo malfermiĝis, kaj elvenis Arturo kontente ridetante.

„Jen do! Al 1836 kaj revene! Por esti certa, mi restis unu-du horojn kaj iom ĉirkaŭrigardis. Jam via vico. Al kiam vi volas iri?”

„Arturo, mi vere ne scias...”

„Kio pri 1314? Batalo de Banokburno! Homo, ĝi okazis nur kelkajn mejlojn de ĉi tie! Pensu pri tio! La plej glora momento de Skotlando, kaj vi ĉeestos!”

Li puŝis min en la skatolegon. Efektive, mi jam vere ekscitiĝis. Kiam li fermis la pordon malantaŭ mi, mi hezitis nur kelkajn momentojn antaŭ ol alĝustigi la ciferplatojn al 24-06-1314. Poste mi fermis miajn okulojn kaj depremis la ŝaltilon. Tintis sonorilo. Mi malfermis miajn okulojn. Nenio ŝajnis ŝanĝiĝinta. Mi streĉis

mian kuraĝon.

Kaj malfermis la pordon. Jen estis Arturo en ties senmebla ĉambro, vastokula kaj entuziasmega. Li alsaltis min kaj kaptis ambaŭmane la refaldaĵojn de mia jako. Li estis preskaŭ senkohera.

„Ĉu vi vidis lin? Ĉu vi vidis Robertson Brus? Ĉu li ion diris? Ĉu tio ne estis absolute la plej mirinda sperto de via vivo?”

Kiel mi jam diris, li estas pli juna ol mi, kaj ankaŭ multe pli forta...

„Jes, jes, mirinda, mirinda!” mi balbutis.

Unu el ni estas freneza, kaj ne temas pri mi. Sed supozeble li ne kaŭzas multan domaĝon, en- kaj el-irante sian skatolegon dum la tutaj tagoj. Kaj eĉ se mi devas pasigi multajn vesperojn aŭskultante liajn priskribojn de la vivo en aliaj epokoj, tio estas malpli enuiga ol televido. Neniu volas sian filon, eĉ surrogatan, enŝlosigi en frenezulejon, se eblas tion eviti.